

# **Elektitaj poemoj de kroataj esperantistoj**



Eldonita de GEO  
2015

# **Elektitaj poemoj de kroataj esperantistoj**

Eldonita de GEO

2015

## **La Enhavo**

[Lucija Borčić](#)

[Dalibor Brozović](#)

[Nikola Bubalo-Slavić](#)

[Zora Heide](#)

[Slavko Ježić](#)

[Damir Mikuličić](#)

[Zdravko Seleš](#)

[Vesna Skaljer-Race](#)

[Antun Šimunić](#)

[Franjo Šlabek](#)

[Mavro Špicer](#)

[Božidar Vančik](#)

[Josip Velebit](#)

# LUCIJA BORČIĆ

## POEZIO

Poezio  
estas io  
inter beno  
kaj kuntreno:  
supren, alten,  
nuben, kanten,  
kun leĝero  
de sincero,  
en intimo  
kun senlimo,  
al la vasto  
sen balasto,  
al la helo,  
al la belo!

## AKACIOJ

En Oktobro freŝa vento  
senindulgas el okcidento,  
branĉoskuas l' akaciojn  
kaj forblovas sekfoliojn.

Branĉoarĉoj ploroĝeme  
nun senhelpe kaj maleme  
veoĝisas ilin svinge,  
senespere, senatinge.

branĉbalance, mortodance  
kun ventkirlo kaj birdtriloj  
alten strebas, flugas, ŝvebas  
akaciaj orfolioj.

Kaj kun veno  
de l' vespero  
pacas kuŝe sur la tero

la folitapiŝ' invita  
de l' foliaro forblovita.

## **KONTRASTE**

Somermeze viglo, bruo  
aŭdeblas el ĉiu korto,  
el ĉiu barko, ĉiu plaĝoparto:  
aŭdeblas najbaroj, infanoj, gastoj  
kaj ne malofte oni eksopiras  
pri l' trankvilo kaj senbruo.

Oh, se eblus  
tiun viglan transcikli  
al la periodo de  
trankvilo, senbruo  
kaj senhomeco  
kia regas nun ĉi tie  
jam kvin tagojn!

## **ARTIST' BLUA**

Maro regas.  
Satanegas  
ondohordo  
al rokbordo.  
Bruas, tondras  
true sondas  
rokomuron  
dum vetkuro.  
Alten soras,  
klifojn boras.  
Ekvoluptas.  
Stonen skulptas  
formojn mirajn  
nombre milajn.

Boton, birdon,  
heroŝildon,  
cervokornon,  
virinformon,

reĝan tronon,  
in-kalsonon,  
virkranion,  
hindan dion...  
Super truo  
form' de gruo.  
Punt' ĉe punto,  
milmil punktoj.

Pont' enmezas  
kaj impresas  
maren gliti,  
groton spiti.

Kaj en groton  
sub ŝtonboto  
tra truaro  
en la maro  
sunradio  
(ho, defio!)  
ŝteleniris.  
Hom' ekmiris  
pri gamravo  
en la kavo.

Kun herbkuno  
en mar' lumo  
disalternas,  
game sternas  
lumoludon  
en marnudon:  
buntkoloro,  
arĝent-oro,  
verde-blue,  
poŭpe, prue,  
jen lazure,  
jen purpure.

Altirita  
de l' ĝu' rita  
hom ennaĝis

por omaĝi  
per ĉeesto  
akvofeston.  
Homon maro  
kaj ondaro  
danke dotas:  
perlamotas.

Dance kreskas,  
fosforeskas  
la surfaco  
kun senlaco.

Okul' gapas,  
maro frapas,  
feste nuptas,  
lude skulptas  
nestojn kovajn,  
formojn novajn.

Ĉiam plue  
frapoflue  
artist' blua,  
skulptist' skua  
sin reĵetas  
kaj impetas  
per majesto  
ĝis ŝtormĉeso.

# DALIBOR BROZOVIĆ

## AL NIAJ KURSFININTOJ

Ho, ni ĉiuj iam vizitadis, ĉeestis  
porkomencantan kurson.  
Sed raraj nur, kaj nur malmultaj restis  
niaj en vivkonkurso.  
La ĉefa not' de nia kara kanto  
estas nek UEA, nek flagverd', nek SAT,  
ke hom' al homo estu, restu frat'  
al tio celas lingvo Esperanto.  
Ja ĉiuj vojoj estas tute bonaj  
nur se honeste per ili vi iros,  
la celojn en ĉies koro burĝonajn  
vi per la samaj vojoj akiros.

Kaj nur parolu! Sen voĉvitamin'  
vin trafos la pela parolskorbuto,  
de ĝi neniam kurace savos vin  
maldensaj etaj gutoj da balbuto!  
Ne restu Lingvo la muta liuto,  
aŭ lud' por tri monatoj aŭ eĉ kvin!  
La Lingvo estu de l' estont' saluto  
al abismoj krutaj de l'homarruin'.

Ho, jam multfoje ĉirkaŭ ni tempestis,  
sed revenis feliĉa animriĉ'.  
Esperas mi: en via kor' ne nestis  
loĝejon sian turpa senreviĝ'.  
Ho, ni ĉiuj vizitadis, ĉeestis  
iam ian porkomencantan kurson,  
sed nur tre raraj, tre malmultaj restis  
niaj en la laciga vivkonkurso.

## AL BOLONJA KONGRESO

*(Parto de la salutparolo ĉe la rnalfermo)*

La verda pacoaz' nur la Rondo  
ja estas, ĉar ĉiu en ĉi mondo



aŭ muso devas esti aŭ kato.

Plej bonajn filojn de land' itala  
allogis centro ambatala,  
Bologna - tio ne estas flato.

El land' kuŝante trans blua maro  
venis nek malamik' nek barbaro,  
najbaro eterna, la kroato.

Por amkonstruaj' modestan brikon  
kunportis mi trans Adriatikon,  
ĉi tien mi venis kiel frato.

## **KARNAVALA SONETARO**

Alkonduko post sep Karnavaloj

Mi demandis min  
"Kial publikigi  
la Sonetaron post Karnavaloj sep?"  
Sed la postan Karnavalon mi tamen  
devos ligi  
al la antaŭa  
per ligo de filo, ne de nep'!

Ĝi do ne malfruos!  
Intime mi supozas,  
ke pro ĝi la rido  
en ĉi Karnavalo bruos.  
Mi eĉ dezirus ke ĝi ankoraŭ plaĉu!  
Kaj al tiuj,  
kiuj ĝin ne ŝatos,  
mi diru:  
"Mi ne flatos!  
Vi simple - kraĉu,  
kaj -  
la sekvontajn paĝojn transiru!"

## **DEDIĈO**

Memordediĉas al Luci'

Sonetojn ĉi kaj ĉi rondelon  
Kaj la oktavojn etajn mi.  
Si por briligi verdan stelon  
En mia kor' ĝis rim-ebri',  
por montri la verdvortan belon,  
Al mi donacis ĝian pardonon:  
Orlibron - la Streĉitan Kordon!

## PROLOGO

Pardonon petas de l' publiko  
Poeto ĉe la vojo kreska  
Se pro la stil' Kalocsayeska  
Ruĝiĝos ĝis la umbiliko.

Ne ploros mi pro la kritiko,  
Entute ne - sed tamen preskaŭ.  
Bonvolon petas de l' publiko  
poeto ĉe la vojo kreska.

Sed se iu animo vespa  
Min pikos per malicaj pikoj,  
Pentriĝos sur la rimobrikoj  
Tuj lia aĉa bildo freska.

Mi bonon petas de l' publiko...

## 1. UNUA SONETO

Hodiaŭ regas princo stulta,  
Eĉ pest' se estus, ni lin festos,  
Ĉe l' princo buntevesta estros  
Ĝojega forto katapulta.

Ĉi-karnavale homoj multaj  
Sin cirke kiel bestoj vestos,  
kaj ĉies vest' kaj gest' atestos  
Pri l' karnavala festo kulta.

Nun festu ĝojon karnavalan  
Ni senprokraste kun ĝoj' vasta,  
Ne estu ni ridinde lastaj!

Kaj mi, por preni kronon balan,  
Ekrajdis mi Pegaz-ĉevalon  
Kaj kronos princon Karnavalon.

## 2. KARNAVALA SONĜO

Ho, mi ne estas superstiĉa  
por kredi sonĝojn, kaj eĉ mala  
Ja estas vero senvuala.  
En sonĝ' mi ne fariĝis riĉa,  
Nek estis sonĝo geedziĝa,  
Sed en la nokto Karnavala  
(*Memoras mi je imago pala*)  
Mi sonĝis en narkot' feliĉa:  
Ĉu unua estas de aprilo,  
mensogo aŭ la trompa brilo?  
En sonĝ' mi vidis estontvivon.  
Ekvidis mi du bildojn helajn:  
Ordaranĝitajn, riĉajn, belajn  
Bibliotekon kaj arhivon!

## 3. PRIPOETIKA SONETO

Rondel', oktavo kaj soneto,  
Ho renesancaj poemformoj!  
En karnavalaj vi sendormoj  
jarcente tintas en ripeto.

Ja ĉiam sonĝos plu poeto  
Pri Viaj rigorĉarmaj normoj.  
Ho renesancaj poemformoj,  
Rondel', oktavo kaj soneto!

Pri Karnaval-princ' en Firenco  
Potenca iam duk' Lorenzo  
Poemojn verkis por publik'.

Ĉi poezipraktik' ŝatata  
Jam estis de burĝar' kroata  
En renesanca Dubrovnik'.

## 4. KARNAVALA FABLOSONETO

Je Karnaval' sovaĝaj bestoj  
Decidis preni homajn maskojn.  
Kaj ili tuj kalsonojn, baskojn,  
Ĉapelojn kaj aliajn vestojn

Elprenis el la feraj kestoj;  
La urs' eĉ kronis sin per kasko.  
Ne sciis mi pli tedan taskon  
Ol serĉi iliajn bestorestojn.

La vulp' bankisto, lup' buĉisto  
Estis, kaj car' leon' pro l' ŝato,  
Kaj hien', nature, advokato.

Sed novaj gastoj sur ballisto  
Apenaŭ aperis - sen admono  
Forkuris ĉiuj pro l' - rekono!

## **5. VORTOLUDA SONETO PRI L' ORDO EN LA RONDO**

Jen la soneto pri la ordo,  
Kondiĉ' por nia sortoporto.  
Kaj ne malhelpos ĉi mokvorto  
Eĉ se nobela ia lordo

Neniam ĝis ĉi nia pordo  
Alvenos en la luksa fordo.  
Sed ne timu ĉi tian sorton,  
Ne trafos nin ĉi sortomordo.

Sen ord' ja estas nur la hordo,  
Aŭ postciklona mara bordo  
En iu torda, norda fjordo.

Sed orde eĉ plej eta forto  
Malmorte kaj sen sortaborto  
Progresas en konkordakordo.

## **6. KARNAVALA FARSSONETO**

En iu malproksima lando,  
Mi ne memoras nomon ĝian,

En fabeltempo vivis iam  
Karolo, grafo, granda dando.

Virinojn ŝatis li kaj brandon,  
Sed ja edzinon havis tian,  
Ke drakon ŝi mitologian  
Dispremi povus sub la plando.

Forkuris iam li al balo,  
La mask' - netravidebla vualo.  
Li trovis tie ĉarman damon,

Ŝin senmaskigis, serĉis amon...  
Karolo restis sen parol' -  
Edzino ridas: "Ho, Karol'!"

## **7. LA STELO KIU ĈIAM LUMU**

Ĉe l' karnavalaj vinboteloj  
Momenton ĉesu trinki, fumi,  
Aŭskultu min bonvole dum mi  
Prikantos al vi unu stelon.

En nia verda ĉi ĉielo  
Ĉi stelo indas ĉiam lumi.  
Ĝi estas - kial ja cerbumi,  
Vi scias jam - "La Suda Stelo".

Por ke ĝi brilu al la mondo  
Lumante kiel juvelaj ŝtonoj  
Starantaj sur la caraj kronoj,

Ho, ne forgesu nia rondo:  
Al Lo So So eĉ sen admonoj  
Torent' alfluu da abonoj!

## **8. FINA SONETO**

En viv' ekzistas karnavaloj  
Kaj pentoj laŭ la religi',  
Eterne regas harmoni',  
Do regu ankaŭ ĉe la baloj.

En ĉiu dolĉ' ioma salo,  
Tro ofte plaĉa komedi'  
Fariĝas aĉa tragedi'.  
Preteru nin ĉi sortofalo.

Finiĝas nun la sonetaro,  
Ke princo ne fariĝu caro -  
Princ' ĝenas nin jam - kaj eĉ tro!

Tro longa ĉio tuj fariĝas  
Tedega, eĉ se ĝi ĝojriĉas!!  
Vin salutegas via Bo.

## **EPILOGO**

Se iu estos malkontenta  
Pri mia karnavalprogramo,  
Se ĝin li trovos eĉ tro plenda,  
Malriĉa je la ĝoj' kaj amo,  
Kaj pri la ŝercoj tro silenta,  
Memoru tiu samideano:  
Eĉ drone en la plenan ĝojon,  
Pripensu elektitan vojon!

# NIKOLA BUBALO- SLAVIĆ

## HO BIRDETOJ...!

Ho, birdetoj belkantantaj!  
Vokas vin la ruĝaŭroro:  
Vi ekflugu sur la branĉojn  
Kaj ekkantu vi el koro!

Kantu vi la gajan kanton  
Por saluti tagon helan  
Kaj por vekti mian Milko'n,  
Kiu songas songon belan.

Kiam hela tag' aperos,  
Venos ni en boskon vian;  
Vi pri kantu nian amon  
Paradizon kantu nian!

# ZORA HEIDE

## LEGENDO PRI LA BONA TRAJNO

Galopas trajno kune kun revoj  
tra nokto nigra kaj tago hela  
en vagon-hejmo milde bonkore  
komforto mola prezentiĝas.

Ekstere blovas fantomo vintra  
beleco dormas en varna sino  
kristalveluro de blanka ĉarmo.

Galopas trajno venas printempo  
verda heroldo de ĝermaj spiroj  
kun perloj floraj la suno ludas  
metalajn vojojn ili brakumas.

Koketas trajno kun flava luno  
sur feraj strioj postrestas spuro.

Galopas trajno venas somero  
marborde flamas ebria sablo  
gutoj da roso dancas sur lipoj  
la maro svingas per blankaj veloj.

Galopas trajno jen aŭtuno  
sur lasta rozo forbrulis amo  
fruktoj aromas sur manĝotablo  
funebre marŝas ruĝaj folioj  
melankolias nuda branĉaro.

Galopas trajno galopas ternpo  
en kofroj kuŝas niaj esperoj  
kupeoj ridas lamentas veas  
muzikas dolĉe vagonaj ridoj.

Galopas trajno vivo kaj morto  
galopas fato nigriĝas ombroj  
lasta etapo de homa fino.





# SLAVKO JEŽIĆ

## SE CI SCIUS

*(la unua kroata esperanta poeziaĵo, verkita en ĉ. 1909)*

Se ci sciuz, kiel granda  
Mordas min doloro,  
De ĉagreno kiel mia  
Pleniĝis la koro! -

Ho pri amo mi revadis,  
Pri feliĉo nia  
Ĉiu penso mia, ĝemo,  
Estis amo cia.

Sed, ve, ĉio nur sur nuboj  
Estis konstruita,  
Kaj de iom da suneroj  
Malsupren ĵetita.

De feliĉo, am lasita  
Suferas la koro ...  
Se ci sciuz, kiel granda  
Mordas min doloro! ...

# DAMIR MIKULIČIĆ

## LA NOMOJ

Estas plaĉe nomiĝi La Tero.  
Vi pikas gratas vin mem sufero mia.  
la arboj krucumas vin poste  
kaj TAMEN vi estas feliĉa.

Belsonas nomiĝi La Ĉielo.  
Vi plenigas malplenigas vin mem  
ekhurlas jen eksilentas tuj poste  
kaj trankviliĝas ĝis la NOVA malsato.

Kaj la nomo La Akvo ankaŭ taŭgas.  
Vi prenas elverŝas vin mem  
la tero absorbas la suno elsuĉas  
kaj DENOVE vi estas savita.

Tio estas nur kelkaj nomoj  
vi povas nomiĝi kiel ajn vi deziras.

## VANE

La bufedo, la tabloj rondaj,  
la cigaredo fumoj ondaj,  
Vane  
la rozo velkas  
en la vazo boteloforma,  
vane  
la fajron en la forno  
envolvis jam cindrodormo,  
vane  
la nokta papilio dancas  
ĉirkaŭ la murlanterno,  
la drinkuloj  
daŭre sidos en siaj anguloj  
ĝis en eterno.

# ZDRAVKO SELEŠ

## ĈIELAJ ĈEVALOJ

El la nebulo eliras  
iliaj nigraj kapoj  
kun steloj surfrunte.  
Iliaj altaj siluetoj  
fiere kuras  
ĉirkaŭ la Tero.  
Ili ĉiam henas  
en matenaj rosoj.  
Mi neniam estos  
ilia rajdanto.

## NE FORGESU!

Nomiĝu li Ian aŭ Luĉijan,  
Jon, Ĝan, Ĝim, Whang  
aŭ iel ajn aliel;  
estu li batita, vundita aŭ mortigita  
en Temiŝvaro, Pekino aŭ Prago,  
sur iu ajn placo aŭ strato  
ĉi- aŭ lastjare,  
nun aŭ en 1968-a,  
nun aŭ en iu ajn alia  
jaro aŭtuna de mondo-komenco.

KIAL, kial li, Jan aŭ Luĉijan,  
aŭ iu ajn alia  
konata aŭ sennoma  
estis batita, vundita kaj mortigita?

KIAL?  
Ĉu por ke denove, post  
jaro, du aŭ dek  
iu alia Jan aŭ Luĉijan,  
post jaroj kiuj sukcese  
forgesadis siajn frapojn, vundojn kaj mortojn,

por ke iu nova sennoma ulo,  
por ke iuj novaj sennomaj kaj sennombraj  
estu batataj, vundataj kaj mortigataj?  
Ho, Jan kaj Luĉijan,  
gis nun batataj kaj vundataj,  
ne forgesu siajn frapojn kaj siajn vundojn,  
ne forgesu siajn mortajn;  
ili mortis por haltigo  
de batado kaj vundado,  
ili mortis por haltigo  
de mortado!

# VESNA SKALJER-RACE

## AŬGUSTO

Iam aŭgustis la koroj,  
arbare, ĉemare,  
liberaj je zorgoj,  
posten'.

Iam aŭgusto signifis  
ĝojon kaj ludon  
en senzorga  
natura festen'.

Iam ĝi ne estis  
korpremo, timtremo  
pro neimagebla,  
reala maten'.

Iam oni estis  
mastro sur vasto  
de l'propra  
gepatra teren'.

Iam ekzistis  
fido pri rido  
sur amika,  
frata mien'.

## KUŜANTE EN HERBEJO

*(Ĉe la rivero Nidelna Trondheim 17. 8 1980)*

Kial inter homoj militoj kaj tim'  
se herboj same verdas  
kaj same odoras  
ambaŭflanke de ĉiu lim'!

Se ĉie fluas riveroj kaj ĉie la pontoj  
same staras super la bluaj ondoj.

Faladas flaviĝinta folio...  
La vigla lerta lacerto  
senmovas.en varma sunstrio...  
Sonorilkoncerto...

Kvazaŭ demandus la preĝejaj turoj,  
kial inter homoj tiom da muroj.

## **ADIAŬO (II)**

Kiel vin forlasi,  
ho maro bela!

Spegule se vi bluas, hela,  
aŭ en spiro se anhela  
vi per forto via muela ruliĝas  
dum la hor' kverela;  
kiam vi aliras min  
sen sci' orela,  
per via fluo ŝtela,  
vi estas,  
maro  
ĉiam bela!

Ho,  
kial esti tiom bela?

Dum en ardo vi,  
duela,  
estas kontraŭ ĉio ĉiela  
kaj per forta frap' martela  
batas fulmo vin kruela,  
maro,  
en pasi' ribela, maro,  
vi koleroŝvela  
eĉ tiam,  
jes,  
eĉ tiam ja  
vi estas bela!

Ne estu, maro, tiom bela!





# ANTUN ŠIMUNIĆ

## FIGURA SENCO DE PONTO

*Al osijekaj esperantistoj*

La popoloj ĝin konceptis  
Belan ponton sur rivero  
Kiel lingvo utopia  
La fratecon ĝi alstrebas  
De homaro praantikva  
Ĉiam restas ĝi sekreto:  
bela ponto sur rivero  
Sub la ponto vortoj muĝas  
Sensencemaj  
Ne tuŝante l' firmamenton  
Vortoj fortaj kiel tajdo  
Plensignifaj kiel morto  
Vortoj mutaj kiel ponto  
Bela ponto sur rivero

## ALVENO DE PACKOMETO

O, la ĉiela meĥaniko,  
Pli pacema ol iam ajn!  
Senerare vi funkcias  
Ne necesas la paniko -  
Via fajro amkolora  
Persubstanca eterna fajn'  
Malglaciigas mensan froston  
O, la amo sendolora  
Nek la bombo nek la tombo  
Findifektos vian voston

# FRANJO ŜLABEK

## INSTIGO DE SONOJ

Kanton mi sorĉan rememoras,  
en mia anim' ĝi stertoras  
pri veo kaj doloro,  
pri larmoj kaj pri ploro.  
Kvankam mi vortojn ne plu konas,  
nur melodi' postrestis,  
tamen daŭre ĝi min respronas,  
montras kie mi estis.

Ĝi bildas al mi naskan vilaĝon,  
kie pasigis mi junaĝon.  
Ĝin junulinoj kantis  
dum rezedaron plantis.  
Resonas same tiu kanto  
en vasta ebenaĵo.  
Per ĝi plenplena estas kampo,  
ĝi estas - edenaĵo.

Susuras ĝin branĉoj siringaj  
ĉe vento ĝenataj kaj vringaj:  
en varmaj antaŭvesperoj  
resonas ĝiaj eroj.  
Kanto ĉi flugas nostalgie  
tra etaj domoj varmaj.  
Vilaĝo aŭskultas ĝin pie,  
okuloj iĝas larmaj.

Esprimas kanto amon ĝue  
kiu forpasis kruele frue  
kun malfeliĉa paro  
en dista la kamparo.  
Tragikon ĝian eterne liutos  
la voĉoj junulinaj,  
en kampoj senfinaj.

Sed vintro frida estas nune,  
kun ĝi la kanto ne iras kune.

La branĝoj malgaje hisas,  
neĝeroj teron kisas.  
Ho, kanto sorĉa! Versoj mitaj!  
Kun raraj, spitaj sencoj.  
Redonu, redonu por ĉiam perditajn  
infanec-reminiscencojn.

# MAVRO ŠPICER

## MIA FANTOMO

Ankoraŭ post la sonĝo ĝi min premis,  
La bildo kaptis min kun ama fort',  
Kaj de l' vidaĵo mia kor' ekremis:  
En ĉi mallumo de la homa sort'.

Nenion ni ravatoj paroladis,  
Dolĉaĵojn suĉis nur du buŝoj nun.  
Pri lando malproksima ni revadis,  
Eterne kie brilas ora sun'.

Fortege logas via sorĉmieno,  
Sed vane vin, ho, serĉas la esper'.  
Pro sopirem' pri via ĉirkaŭpreno  
Pereas mi de l' ĉarma songaper' ...

## PRINTEMPO

Belega printempo! ĝuegoj subitaj,  
Rigardi la ĉarmon de via plezur',  
De l'suna brilego ĉirkaŭe vekitaj  
Ekfloras donacoj de l'rava natur'.

Al viaj okuloj belegaj simile  
Ridetas l'eterna ĉielo je ni;  
Plenigu sorĉige, plenigu do brile  
La korojn per novaj esperoj, ho Di'!

Branĉetojn florriĉajn fleksigas zefiro,  
Per kio plenega d'odoro l'aer'.  
Birdara sur l'arboj sonigas admiro  
Saluto, sorĉisto, amika sincer'!

Saluto, sorĉisto, vi sunfavoranto!  
Samtempe ravita ĝin vokas la kor'.  
Vi vivon kaj amon kaj ĝuon donanto  
Mildega konsolo de homa dolor'!



# BOŽIDAR VANČIK

## HO, BELAS VIV'!

Abunde sentis mi la sortovipojn  
En mia viv', kaj rare ridis mi.  
Tro ofte dornoj koron pikis, lipojn  
Kurbigis la dolora konvulsi' .

Malriĉis flore mia primavero,  
Dezerte sekas la somero nun'.  
Kaj ĉu post ĉio restas eĉ espero,  
ke sukajn fruktojn portos la aŭtun'?

Kaj tamen al mi karas miaj tagoj,  
Kaj time pensas mi pri l' nepra fin'.  
Ho, estas dolĉ' en plej turmentaj plagoj!  
Ho, belas viv', mi arde amas ĝin!

## MIA VIVO

L' ESPER' - ĝi estis tiu rozkolora flamo,  
Brilinta vivaŭrore ĉe mia horizont':  
Mi belajn revojn plektis kaj flegis kun plejamo  
Kaj kredis je fabela feliĉo de l' estont'.

Sed venis la realo - la suno ardradia,  
Kaj rozkolora sorĉo de mia vivmaten' -  
Por ĉiam ĝi forpalis. La revmiraĝ' de mia  
Naiva infanaĝo foriĝis sen reven'.

Kaj nun infere ardas ĉi senindulga suno,  
kaj brulaj ĝiaj sagoj penetras ĝis la kor'.  
Kun froste frida mok' min evitas la fortuno.  
Vunditan mian koron tiranas la dolor'.

## PRINTEMP' VI ESTAS!

Printemp' vi estas ja! Sur ĉiu vango  
Ja ĉe vi freŝe puncas roz' gracia,  
Kaj ruĝas lipe la papava sango,

Kaj blankas la dentar' lilia.

Kaj kio povus esti via ĉarma,  
Sveltforma trunk', ol suka tig' de floro?  
Kaj via spiro - jen zefiro varma!  
Kaj via voĉ' - birdetsonoro!

Radias via suna okulparo  
Printempan brilon el la ardprofundo!  
Kaj via ŝvela kaj densa hararo -  
Jen la printempa kresk-abundo!

# JOSIP VELEBIT

## EPPUR SI MUOVE

*Honore al urbo Varsovio okaze de  
la 44-a Universala kongreso de Esperanto,  
en la jaro 1959-a*

Rapida trajn' veturis ja tro lante  
por mi vojaĝfebrante en kupe',  
mi provis helpi min modkanton kante,  
sed pensoj dise flugis sen obe'.

Distrita mi tempason ne kontrolis:  
dum tra la nokt' rapidis trajn-fantom',  
nek aŭdis mi la ridon kiu bolis:  
parolis tri polinoj pri diplom'!

Mi nun aliris kaj la vorto venis  
al metropol' senkulpa brulofer',  
"Ho Varsovi'! - knabina vort ekstremis  
kiom vi , fine, pagis por liber'!"

"Montriĝis vana ĉiu rezistprovo,  
- daŭrigis skizi dua blondulin' -  
la povra urb' sen ajna defendpovo  
la tuta baldaŭ iĝis nur ruin'"

Post tio krom la detruita urbo  
esperis mi ekvidi ĉe l' alven'  
kondamnon de la faro sur vizaĝoj  
kaj trovi pezajn signojn de l' korpem'.

Sed Varsovio kun videblaj spuroj  
de l' man' barbara, kies sanga pian'  
ĝin neniigi volis per teruro  
de l' bombard' kaj nekredebla flam',  
akceptis nin kun kora sincereco,  
ĝojante vidi nin sur sia ter',  
fratam' en pura sindonem' sentiĝis,  
ĉielo, kvazaŭ, parte, descendis al ter'.



Lifto en oketaĝa dom' nin supren levis  
tra stratoj ekfunkciis ree tram',  
por novaj viv-postuloj oni strebis jam:  
pri ŝajna tromp' unue, mi kredi devis.

Ne povas mi pripentri kiaj sentoj  
min skuis, dum mi miris tie vin,  
ho urb' heroa, kaj en legendoj  
nun vivos plu pro martirec' sen fin'.

En moment', dum staris mi senmove  
kun nedireble pia sent-agord',  
fluustrante, nure, mi: "Eppur si muove",  
eligi povis el profund' de l' kor'.

## VIZAĜO ŜIA...

Vizaĝo ŝia estas blanka neĝo,  
Blondetaj haroj: bosko am-favora,  
Okuloj ĉiam pretaj por sieĝo  
Kaj fajne tranĉaj lipoj eĉ por preĝo  
Konvenas: pie mildaj, senparolaj.

Spite al mia edza kor' poltrona  
Delonge ravas min la svelto mola  
De ŝia korp' malŝpare am-propona,  
Kaj mamoj indaj al reĝin' surtrona,  
kaj lipoj pie mildaj, sen parolaj.

Ŝi feliĉigas, malgraŭ ke ekflamos  
La lakta karn' neniam, kaj ĉi glora  
In-korp' nenies liton ekornamos,  
Kaj same ja neniam kise amos  
La lipoj pie mildaj, senparolaj.

Ĉi nura mia Bel', kiu al Amo  
Instigas, al sincera am' elkora,  
Estas ja ĉarma dam' - el porcelano  
Bazar-fenestre, la eden-infano,  
Kun lipoj pie mildaj, sen parolaj.

## LA TAGOJ PASAS ...

La tagoj pasas, noktoj pasas,  
bild-post-bilde for,  
la jaroj korpon, koron ĉasas,  
restas nur dolor'.

L' anim' en solo foliumas  
ĉi bildlibron nun,  
estintan vivon ĝi prilumas  
en sol' kaj en kun'.

Junulo, jen, en mondon iras,  
pelas lin fisort',  
sed ve, ĝendarmo lin retiras:  
mankas ja pasport'!

L' alia freŝa cerb' grandplana,  
multpromesa knab',  
perdis vivon sub sangama,  
akra ponard-frap'.

Kaj la knabina korp' lertgesta  
vibras en plenlum',  
ĝu' danca iĝis malbonŝanca  
por ŝi, mortopun'.

Kaj fine kara kap' grizhara  
laca pro vivkroz'  
kaj ŝia plend' pri viv' amara,  
revoj pri ripoz'.

La tagoj pasas, noktoj pasas,  
bild-post-bilde for,  
la jaroj korpon, koron ĉasas,  
restas nur dolor'.

## **NOKTA KANTO**

Tra la sensona, dezerta urbo, noktohore, sub lampolumoj,  
mi tute sola vagas, akompanata nur de mia fidela ombro,  
dum la pensoj, simile al ensorĉitaj birdoj, kondamnitaj  
al riska, senhalta flugo, flughastas al senfinaj foroj ...  
Mi vagas sola - same kiel en multaj mondurboj ĉimomente  
vagas iu homo same tiel sola - kaj portata de l' koro-

morda deziro, mi etendas la manojn, kvazaŭ palpilojn  
al landoj milojn da kilometroj fore, al miaj zorgoplenaj  
amikoj sub la verda standardo, kaj dum la koro, ĉi hazard-  
ludanto bategas bruste, inkube min tentas la malbonon  
konjektanta penso:

Ke morgaŭ aŭ postmorgaŭ ĉiuj mondĵurnaloj per grandaj  
literoj sciigos pri la nova krimo, kaj la altaj kamentu-  
boj etendiĝantaj al la ĉielo, fariĝos oreltranĉaj  
laŭtaj sirenoj, dum niaj paŝoj, kiuj savon serĉas,  
la paŝojn de la samideanoj, kiuj ekiris renkonte al la  
mondo, abrupte haltigos la mortosemaj ŝtalaj murdotuboj.

## GAZELO

Doloras min, ke mi forlasas vin, hejmland'  
bonaĵo mia,  
Destin' ordonas la disiron, hejmland'  
bonaĵo mia!  
necertaj tempoj vin atendas, plej kara  
en ĉi vivo,  
super ĉio plej aminda, hejmland' bonaĵo mia!  
Sennombraj estas la danĝeroj en ĉi arbareg'  
de l' mondo,  
kiuj multe vin minacas, hejmland' bonaĵo mia.  
Ho, de praaj tempoj estas vi logaĵo de luparo;  
gardu vin la bona Dio, hejmland' bonaĵo mia!